I. F. E. A.

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente: alla INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO "I.F.E.F."; alla UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO "U.E.A." e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA "F.E.I." (Ente Morale D.P.R. 28-6-1956 nº 1720).
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - BOLOGNA.

# I N F O R M A   B U L T E N O = I T A L A   F E R V O J I S T O

Redakcio: Via Donato Creti, nº 61 BOLOGNA (Italio) - Tel. 39.90.71.

Nº 9 - 10 Septembro kaj Oktobro 1964-a 14-a Jaro

## SALUTO DE NIA NOVA PREZIDANTO

Alprenante la oficon de Prezidanto de I.F.E.A. mi sendas al ĉiuj fervojistaj samideanoj dankan saluton kaj la bondeziron ke nia kunlaborado povos antaŭenpuŝi nian movadon.

PROF.D-RO INĜ. BERNARDINO LATTANZI DI MONTERUBIAGLIO
Prezidanto de Itala Fervojista Esperanto-Asocio.

## C O M U N I C A T O

Col 14° Congresso Nazionale della "Itala Fervojista Esperanto-Asocio" tenutosi il 20 settembre 1964 a Sorrento, nel quadro del 35° Congresso Italiano di Esperanto, si é aperto il nuovo anno finanziario 1964-65.
Preghiamo vivamente i nostri Soci di versare le quote al più presto.

Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega al presente bollettino, il bollettino di versamento nel C.C.P.nº8/24094 intestato all'IFEA Via Donato Creti, 61 BOLOGNA.

In conseguenza delle decisioni prese durante i Congressi di Bruxelles e Sorrento, le quote sociali per l'anno 1965 sono le seguenti:
- Associazione all'I.F.E.A., all'I.F.E.F., all'U.E.A. e alla F.E.I. con abbonamento alla rivista "L'Esperanto": £. 2.500,- annue.
- Associazione solamente all'I.F.E.A. ed all'I.F.E.F. (per quei Soci che pagano le quote di associazione alla F.E.I. ed all'U.E.A. direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali): £. 1.000,- annue.

Si pregano vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali per l'anno 1964, e continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni urgenza le quote 1964 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti oppure trasmettere le loro dimissioni per non dover pagare le loro quote anche per l'anno 1965 alle suddette Associazioni.

## RAPORTO DE LA 14-a NACIA KONGRESO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO

Sorrento - Dimanĉon la 20-an de septembro 1964-a

La 14-a Nacia Kongreso de IFEA - en la kadro de la 35-a Itala Kongreso de Esperanto - okazis en Sorrento, dimanĉon la 20-an de septembro 1964-a, en la salono de la Klubo de la Fremduloj. Prezidis la kunvenon nia S-ano Inĝ.Azzi el Como, kun la jena tagordo: 1) Raporto de la Sekretario kaj de la Kasisto; 2) Elekto de la Nova Estraro; 3) Eventualaĵoj kaj diversaĵoj. Ĉeestis 21 membroj kaj estis reprezentitaj 10 membroj. Ĉeestis ankaŭ kelkaj eksterlandaj observantoj inter kiuj nia germana kolego Ricardo König el Weiden-Opf. La ĉeestantoj kvankam ne multnombraj reprezentis preskaŭ ĉiujn partojn de Italujo: Aosta, Bologna, Como, Ferrara, Genova, Massa, Roma, Torino, Trieste, Udine, Voghera.

Post la morala kaj financa raportoj okazis elekto de la nova estraro precipe por anstataŭi nian tre amatan Prezidinton Kav. Giuseppe Zacconi forpasintan la lastan 16-an de marto.

La jarkotizon por 1965-a oni fiksis en £. 1000, pro la plialtigo aprobita dum la 16-a I.F.E.F.-Kongreso en Bruselo.

La Sekretario klarigis la novan sistemon (starigitan de I.F.E.F.) de la komitatanoj elektitaj de la landaj asocioj, kiuj formas Komitaton kiu direktas la Internacian Federacion kiel "Parlamenton" kaj elektas la Estraron kiel "Registaron" de la Federacio mem.

La estrarelekto, kontrolita de samideanoj Catena de Bologna kaj Trevisani de Udine havis jenan rezulton: Estis elektitaj:

1) Prof.D-ro Inĝ.Bernardino LATTANZI di MONTERUBIAGLIO el Roma,
2) D-ro Inĝ. Giordano AZZI el Como,
3) D-ro Inĝ. Otello NANNI el Bologna,
4) Per.Ind. Germano GIMELLI el Bologna,
5) D-ro Inĝ. Giuseppe ALBONETTI el Bologna,
6) Sig. Giulio CATENA el Bologna,
7) Rag. Aldo Formaggio el Torino,
8) Per.Ind. Agostino RIGHI el Bologna,
9) Universitata Studento Antonio DE SALVO el Roma.

Ricevis voĉdonojn: S-roj Kom.F.D.Ramolfo el Torino, D-ro Adv.G.Berelli el Verona, Geom.G.Riotta el Torino, C.Corradi el Albenga, D.Lanzoni el Bologna, G.Quarone kaj U.Sansoni el Milano, G.Romiti el Bologna, Per.Ind.G.Gilardi el Genova.

Oni konfirmis kiel Honorajn Membrojn: Lian Moŝton Adv. Raffaele Bagnulo el Bologna kaj Grafon Kolonelon Antongiulio Fontanive Mazzaron di Pratalbo el Roma.

La nova estraro elektis kiel Prezidanton Prof. D-ron Inĝ.Bernardino Lattanzi di Monterubiaglio; Kiel Sekretarion Per.Ind.Germano Gimelli; kiel Vicsekretarion Un.Stud.Antonio De Salvo; kiel Kasiston S-ron Giulio Catena kaj kiel Kaskontrolantojn D-ron Inĝ.G. Albonetti kaj Per.Ind. A.Righi.

Inĝ.Azzi legis leteron de la novelektita Prezidanto Prof.B.Lattanzi, kiu ne povis ĉeesti pro la morto de la Patro; en tiu letero li antaŭakceptas la postenon al kiu li estas elektita. Oni komisiis Ing-ron Azzi transdoni al nia nova Prezidanto la plej sincerajn kondolencojn okaze de la grava perdo kiu trafis lin, je la nomo de la Estraro kaj de la tuta membraro de I.F.E.A.

La Sekretario Gimelli donis informojn pri la proksima 17-a I.F.E.F.-Kongreso kiu okazos de la 22-a ĝis la 28-a de majo 1965-a en Hamar (Norvegujo) kaj informis pri la peto ricevita de I.F.E.F.-Estraro, por organizi estontece Internacian Fervojistan Esperanto-Kongreson en Italujo.

La unua kunsido de la nova estraro okazos la 4-an de novembro 1964-a en Verona okaze de la memoriga manifestacio pri nia Prezidanto Kav. Zacconi organizota de la Veronaj samideanoj.

<u>25-a JUBILEA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO</u> - <u>30-a INTERNACIA KONGRESO DE IKUE</u>
Valencia, 21-a ĝis 24-a de julio 1964-a — Valencia, 23-a ĝis 29-a de julio

++++++++++++++

Estas la tria fojo ke la Internaciaj Katolikaj Esperantistoj renkontiĝis en Hispanio, lando kiu havas kiel speciala karaktero plenan fervoron kaj korinklinon al la Sanktega Virgulino. La tuta teritorio estas semita de diversaj bildoj de la Dipatrino. Tri el ili prezidis la tri internaciajn renkontiĝojn de la Katolikaj Esperantistoj en Hispanio, kiel oportune substrekis D-ro de la Puente, Prezidanto de Hispanaj Katolikaj Esperantistoj, en sia bonveniga parolado. La unuan fojon, la Eukaristika Esperanto Mondkunveno okazis en Barcelono, dum la jaro 1952-a, sub la protektado de Nia Sinjorino de Monserrat, Patronino de la Kataluna Regiono. La duan fojon, la 26-an Internacian Kongreson de Katolikaj Esperantistoj, okazis en Zaragoza, dum la jaro 1956-a, ĉe la piedoj de Nia Patrino la Sankta Virgulino de la Kolono (del Pilar). Valencio, nunjare, estis la tria urbo de Hispanio kiu akceptis la I.K.U.E.-Kongreson, sub la protektado de la Virgulino de la Senhelpuloj (Desamparados).

Multaj italoj, inter kiuj multnombraj el Bologna, partoprenis al la du Esperantaj Kongresoj en Valencio, la nacia kaj la internacia katolika.

Valencio, la tria urbo de Hispanio, akceptis nin kun sia ĝentila gastameco, kun sia pura kaj belaspekta domaro, kun siaj monumentoj kaj palacoj, ĝardenoj

kaj muzeoj, sed precipe per sia afabla loĝantaro. En diversaj gravaj lokoj de la urbo ni havis niajn kunvenojn, indikitaj per esperantistaj flagoj kaj grandaj afiŝoj. Oni ne ŝparis distraĵojn al la alvenintaj alilandanoj. Kuniĝis diversaj festaj celebroj: la 25-jara paca regado de Franco, la soleno de Sankta Jakobo, Protektanto de Hispanio; Taŭrofestoj, regionaj dancoj, muzikaj konkursoj kaj fine rava florbatalo laŭlonge de la Alameda strato. Por la esperantistoj, la 25-a jubilea Hispana kongreso de Esperanto kaj tuj sekve la internacia Katolika kongreso.

Civilaj kaj religiaj instancoj tre afable akceptis, alparolis, regalis la 300 esperantistojn, kiuj ĝuis urbon kaj ĉirkaŭaĵojn, pasante de mirindaĵoj al mirindaĵoj. Tiuj, kiuj vizitis la vilaĝon Cheste, certe longe memoros la simplajn kamparanojn, kiuj parolas esperante tiel ĝenerale, ke la paroĥestro povas prediki en la universala lingvo, konsciante, ke ĉiuj komprenas lin. Neforgesebla tiu ekskurso pro la varma gastameco de la vilaĝanoj kiuj akceptis kaj regalis al ni malavare en la urbodomo. La saman vesperon, en la tre luksa "Club Nautico" de Valencia okazis frata vespermanĝo regalita de la Urbestro (Alcalde) de Valencia kaj de la Provinca Deputitejo (Deputacion Provincial) al la tuta kongresanaro.

Mirindaj la ekskursoj al la malnova roma urbo Sagunto, al la lago de Albufera kaj al la strando de Cullera.

Sed ĉi tio ne malzorgis al ni la kongresajn laborojn! Spite de la abunda ŝvitado ni ĉiutage kunvenis por niaj diskutoj, kiuj kelkfoje tre alvarmigis la fervorajn parolantojn. Ĉar la 31-a I.K.U.E.-Kongreso alvokos nin al la ĉarmoplena Svislando, dum 1966-a, ni adiaŭis nin unu la alian per la slogano "nun en Valencio kongreso en "ŝvitlando"(pro la ŝvitado) ĝis la revido en Svislando".

Valencio restos neforgesebla ankaŭ por la bela kongreso, kiu la organizintoj scikapablis pretigi al la katolika esperantistaro.

## CONVEGNO DEL GIORNO 4 NOVEMBRE 1964 A VERONA

Verona chiama a raccolta tutti gli esperantisti che desiderano dimostrare la loro passione per la nostra lingua arricchendo la propria possibilità di parlarla con appropriata precisione di vocaboli.

E' stata per tale riunione scelta la data del 4 NOVEMBRE p.v. quale chiusura dell'anno 1964 e come inizio dell'anno 1965. Sono invitati con particolare sentimento di fraternità tutti i ferrovieri perché si vuole commemorare in questa riunione il nostro carissimo emerito Socio Cav. ZACCONI che spiritualmente sentiamo sempre a noi presente.

P R O G R A M M A

ore 9,30 riunione nella Chiesa S.GIOVANNI IN FORO - Corso Portoni Borsari per la S.Messa.

ore 11,00 riunione in Piazza Bra - Caffè Olivo - per la visita ai monumenti della città.

ore 12,30 precise. Colazione in un ristorante cittadino.

ore 14,30 precise. Inizio del convegno. Commemorazione del Cav.Zacconi. Concorso "STELLA D'ORO" e, tempo permettendo, la nostra Socia Prof. Zecchinato, presenterà dei films a passo ridotto sui suoi viaggi .

I partecipanti sono vivamente pregati di annunziarsi al più presto per la prenotazione del pranzo al seguente indirizzo: Sig.na ANTONIA BONOMI, Via Camozzini, 15 VERONA Segretaria U.E.C.I., la quota relativa é di £.1500 che può essere inviata o alla Segretaria Antonia Bonomi, Via Camozzini 15 Verona o a mezzo del Conto Corrente Postale n°28/14016 intestato a Galbusera Franco, Vicola Ghiacciaia 6 Verona. Per eventuali informazioni i partecipanti potranno telefonare ai n. 45.396 e 22.062 di Verona. Samideani saluti.

K O N K U R S O

U.E.C.I. (Unione Esperantisti Cattolici Italiani por plibone interesigi la esperanta lingvo al tiuj kiuj jam konas ĝin kaj ĉiam plibonigi la konadon, starigas premian konkurson kiu nomiĝas "ORA STELO" kaj ĝi vidos sian unuan eldonon en Verona je la 4-a de novembro 1964-a.

Povos konkuri ĉiuj esperantistoj enskribitaj ĉe kiu ajn asocioj.

La unua premio estos unu ora stelo kiu dorsflanke estos gravurita la moto kiu karakterizos la temon de la kunkurado kiu estos ĉiuj foje varia. La dua kaj la tria premio estos meritaj diplomoj. La temo de la unua eldono baziĝas sur la konado de la vortoj kaj la moto estas "LA VORTARO ESTAS MIA".

La provo konsistas el tio: la kandidato forprenas el ujo dek vortoj de la oficiala plena vortaro, kaj li devos precize klarigi esperante la signifon dum maksimume unu minuto po vorto. La mallongeco kaj la precizeco estos la juĝa kriterio de la juĝonta komisio. La komisio estos de tri personoj: Prezidanto de U.E.C.I.- Katedrano kaj Reprezentanto de F.E.I. kaj ĝia juĝo neapelacia. Se neniu kandidato rezultos venkonta, la premio ne estos asignata. Se eble okazos ke kandidatoj atingos samajn rezultojn, oni faros novan provon. La enskriboj devos alveni antaŭ la 3-a de novembro 1964-a al: F-ino Antonia BONOMI ĝenerala sekretarino de U.E.C.I. Via Camozzini 15 VERONA

## NEKROLOGO

La Redakcio de "INFORMA BULTENO-ITALA FERVOJISTO", la Estraro kaj la Membraro de I.F.E.A., sendas al la Prezidanto Prof.D-ro Inĝ.Bernardino LATTANZI DI MONTERUBIAGLIO, la plej sincerajn kondolencojn pro la morto de la patro kiu trafis lin.

## "KONTAKTO" JUNULARA REVUO

KONTAKTO, junulara internacia revuo de T.E.J.O., ebligas al junularo egalraite kaj samgrade, dank'al Esperanto preni la scion pri la mondo; ĝi ligas en si ĉiujn unuecigajn faktorojn de la Esperanto-junularo. Ĉe ĝiaj paĝoj renkontiĝas junularaj enueco kaj ideoj.

KONTAKTO enhavas seriozajn artikolojn pri aferoj, kiuj aparte interesas la junularon. Ĝi aperas kvarfoje jare. La Abonprezo en Italio estas 1500 liroj; sed ĉiuj gejunuloj sub 25 jaroj, kiuj estas individuaj membroj de U.E.A. kaj ricevas la revuon "ESPERANTO", ricevos ĝin senpage; t.e. la gejunuloj sub 21 jaroj ricevos de UEA la "Jarlibron","ESPERANTOn" kaj "KONTAKTOn" per 15 guld; tiuj inter 21 kaj 25 jaroj ricevos la samon per 20 guld. -Do aliĝu al U.E.A.- La gejunuloj inter 25 kaj 100jaroj....abonu "KONTAKTOn" ĉe FEI, Via Po 7 TORINO, c.c.p.n°20/37768 aŭ rekte ĉe: "KONTAKTO"-UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176 ROTTERDAM 2 (Nederlando).

Por informoj, kunlaborado kaj sendo de artikoloj, rakontoj, poezioj, k.t.p. kontaktiĝu kun itala redaktoro de "KONTAKTO":
Gaspare BRACCHI, Via Caimi, 54 - Tel. 23242- SONDRIO.

## EL POPOLA ĈINIO AKCEPTAS ABONANTOJN POR 1965

"ElPopola Ĉinio" estas esperantlingva kaj dumonata periodaĵo eldonata de Ĉina Esp-Ligo. Ĝi aperis ekde 1950. Ĝi raportas pri diversaj aferoj de la nova Ĉinio kaj pri Esperanta movado. Kun kolora kovrilo, bela aspekto, akurata aperado kaj modesta prezo ĝi estas vere inda revuo por ĉiuj esperantisto. Nun la Libroservo de Ĉ.E.L. komencas varbi ekde 1 oktobro 1964 ĝis 31 januaro1965 abonantojn de 1965 kun memorindaj donacaĵoj respektive por ĉiuj abonantoj kaj varbantoj. SENDU AL LA LIBROSERVO DE Ĉ.E.L. ADRESOJN DE VIAJ AMIKOJ, KIUJ ANKORAŬ NE SCIAS PRI "EL POPOLA ĈINIO", POR KE ILI RICEVU DE ĜI SENPAGAJN SPECIMENOJN! Jarabono: 500 liroj por unu jaro, 1000 liroj por tri jaroj. Enlanda peranto: ITALA ESPERANTO FEDERACIO, Via Po 7 TORINO (Italujo). Nia Asocio povas peri la abonon. Oni ankaŭ povas sin turni rekte al la Libroservo de ĈEL, P.O.Kesto 313 PEKINO (Ĉinio).

ESPERANTO EN LA RADIO - RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - DISSENDOJ JARO 1964-a

NOVEMBRO 1964-a: Ĉiujn merkredojn: Kuriero de Esperanto.
Mardon la 3-an: Tra la literaturo - vendredon la 6-an: Lasta etruskologia eltrovaĵo apud Romo - mardon la 10-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 13-an: Italaj belartaj urboj: Modena - mardon la 17-an: Italaj kanzonoj en Esperanto vendredon la 20-an: Verkistoj amikoj de Esperanto: Julio Verne - mardon la 24-an: Leterkesto - vendredon la 27-an: Italaj Komponistoj: Giacomo Puccini.

La Fakestro: Luigi MINNAJA